# CONCORDE

## NICA STELO

NICE - ESPERANTO - COTE D'AZUR

Abonprezo : 2 F
Subtenabono : 5 F

Organe Culturel

*Direktoro* :
**Hubert FEREZ**
7, Avenue de Reims
NICE (Francujo)

**C. C. Postal TOULOUSE 632.15**

**TRIMESTRIEL**


Nº 14 JUILLET I967

### I N V I T O

Ciuj Esperantistoj estas kore invititaj partopreni la manifestacion kiu okazos en CANNES, la 23 an de julio, kies PROGRAMO estas :

10 h - DISPONADO DE DIPLOMOJ KAJ PREMIOJ AL LA LAUREATOJ

de la Esperanto-kursoj
sub la Honora Presidanteco de Sro CORNUT GENTILLE
Député-Maire
en Salono du Palais des Festivals ( Promenade de la Croisette )
kun Esperanto-kantoj de la laŭreatoj

11 1/2 h - KOMUNA IRADO AL STRATO ZAMENHOF kie estos metita

fasko de floroj.

13 h - BANDEKO en Restoracio "PIERROT Ier" 51, Rue Félix Faure,

MENUO : 18 F (kun Vino kaj Servico enkalkulitaj)

Melono
Ravioloj laù Nica modo
Kuniklo laù ĉasista modo
Verdaj fazeoloj
Glaciaĵo

(Antaùpago al H. FEREZ, Nice-C.C.P. Nº 4 621 60 MARSEILLE)
Ne manku tiun lastan rendevuon antaù la ferioj ! D A N K O N !

Hubert FEREZ


"CONCORDE" - Inscrit à la Commission Paritaire des Papiers de Presse sous le numéro 38.390.

Le Gérant : Hubert FEREZ.

## ESPERANTO EN ROTARIO

De la 21 a ĝis la 25 a de Majo okazis en Nice la 58 a Konvencio (t.e. la jara Universala Kongreso) de la Rotario Internacia kaj por la unua fojo, Esperanto-Stando estis organizita en tiu impona manifestacio.

Tion oni dankas al pluraj rotarianoj el Nice, kiuj estas tre favoraj al nia ideo kaj kiuj havigis al ni oportunan lokon kaj materialan helpon por bona efektivigo.

Sed la plej gravan helpon alportis la anoj de la Esperanto-Grupo de Nice, kiuj komprenante la intereson de tiu prezento, dediĉis sindoneme ĉiujn siajn fortojn al konstanta deĵoro, senlaca parola propagando, disdono de propagandiloj, akcepto de la eksterlândanoj ktp. Inter multaj S-ro H. PEREZ, F-noj Comino, S-roj Pomerol, Kreibig, Pazzini estas speciale dankindaj.

Nedubeble oni povas esti tre feliĉaj pri la rezultoj atingitaj. Kiom da preterpasantoj manifestis elkore sian entuziasmon kiam ili nin trovis ! Ĉefe, tiuj, kiuj ne multe (aŭ tute ne) komprenis la paroladojn faritajn en la franca aŭ en la angla lingvo sed ankaŭ la francoj kaj la usonanoj, kiuj malkaŝe rekonis, vidante nian materialon, diskutante niajn argumentojn, ke Esperanto estas la sola taŭga rimedo por internacia facila interkompreno.

Certe niaj klopodoj ne estos perditaj kaj ni povas esperi ke en Rotario ili estas semo, kiu prosperos kontentige.

R. FIQUET.
Rotariano kaj Esperantisto

---

N.D.R. - Tiu grava evento fariĝis startpunkto de Rotaria Asocio de Esperantistoj, do "RADE", tute trafe nomita, ĉar ĉiu scias ke la emblemo de la Rotario estas ja rado ! Tiun Asocion direktas : Sro Raymond FIQUET (la sindonema iniciatinto) el Nice, (I. Place Garibaldi) Sro Norman WILLIAMS el Britujo kaj Sro Dino FABRIS el Italujo.

Ni esperas al tiu juna sed certe triumfonta Asocio rapidan disvolviĝon H.F.

## FEDERACIA KONGRESO EN AVIGNON ( 23an de Aprilo)

La Kongreso de la Provenca Esperanto-Federacio disvolviĝis, sub la Prezidanteco de Profesoro Marcel JULLIEN, en urba impona palaca salonego. Tiu Kongreso, ĉiurilate, plene sukcesis. Dum la laborkunsido, Sro MATHIS, el Solliès-Ville (Var) prezentis, meze de varmaj aplaŭdoj, siajn multnombrajn gelernantojn, kiuj tre bone kantis. Granda intereson vekis, en la Kongresejo, riĉa ekspozicio de plej diversaj esperantaj verkoj, kies organizinto estis nia samideano LENTAIGNE, el Montpellier.

Post la laborkunsido la kongresanaro estis oficiale akceptita de la urbestro kiu, oferante honorvinon, diris sian admiron por la alta misio de la esperantistoj. La Prezidanto respondis per noblaj dankemaj vortoj kaj faris trafan, interesan skizon pri la vivo kaj la verko de Zamenhof.

La komuna bongustega manĝo kiu sekvis okazis en la bona restoracio "des Sources". Poste la loka kongresa komitato regalis nin per gajaj Provencaj dancoj

prezentitaj de la en la regiono fame konata folklorika grupo "Reneissenço" el Védène (Vaucluse). Tiu bela tago finiĝis per intersplena vizito de la urbo sub la konduko de Sino S. HUMM, kiu per tre lertaj komentoj revivigis antaù niaj okuloj la belan AVIGNON tra la diversaj epokoj.
Omaĝon al Samideanino S. HUMM kiu, kun nur kelkaj gekunlaborintoj, inter kiuj gesinjoj Gente organizis sendifekte tiun kongreson.

La proksima Federacia Kongreso okazos en 1968 en TOULON.

---

## LA VIVO DE LA GRUPOJ

I - AVIGNON - Ni notu la amikajn rilatoj de la grupo kun la deputito-urbestro Sro DUFFARET, kiu akceptis la Honorprezidanteco de la Kongreso. La grupo partoprenis la filatelistan ekspozicion en Avignon-Sorgues. Post la Kongreso la libro-ekspocio estis prezentita al la gelernantoj de la du "Ecoles Normales" de Avignon. Post tiu ekspozicio Sino Simone HUMM komencis kurson de Esperanto al 20 studentinoj de la Ecole Normale.

II - CANNES - Dank' al la konstanta sindonemo de Sro TRIOU, Direktoro de la movado en Cannes, al Sro LANZO, organizinto de la kursoj, Delegito de l'Komitato Konkordo, al Fino Paulette Lambert, Profesorino en la Muzika Konservatorio, al Sro GILLES Sro FONTANET, Esperanto altiras nun la atenton de la Publiko. La proksima manifestacio kiu okazos en Cannes, la 23 an de julio kaj al kiu ĉiuj esperantistoj el la tuta regiono estas invititaj kronos la sukceson en Cannes.

III - GAP - La grupo kunvenas regule la unuan dimanĉon de la monato en la salono de la Turismoficejo.
La du kursoj komencitaj en lasta oktobro kontentige finiĝis la 15 an de junio. En publika superkurso 3 komencis , kaj tri finis la lecionojn. Dù aù tri lernintoj kapablus trapasi la ateston pri lernado, sed ni ne starigis ekzamenon ĉijare. Eble ni retrovos ilin venontan jaron antaù la ekzamenkomisiono okaze de la Federacia Kongreso en Tulono. Ni jam planas la aranĝon de 2 novaj kursoj en proksima aùtuno, kaj verŝajne unue kontaktos la gejunulojn de la asocio "Le Foyer des Jeunes

Roger COLNEY

IV - MARSEILLE - La agado de nia centro estas sufiĉe kontentiga dum la lastaj monatoj majo kaj junio. En majo ni prezentis allogan montron en la kadro de la ekspozicio pri Jugoslavio, en elementa lernejo Saint-BARNABE, dank'invito de nia samideano CLAVEL.

Ni starigis gravan renkontiĝon en la farmobieno de niaj geamikoj BERRET, en GELONY, apud Aix. Pli ol sesdek personoj partoprenis. La 22 an de Majo, ni akceptis en nia sidejo, nian amikon SCHWERIN el Aùstralio. Sinjoro Schwerin lerte prelegis pri sia lando kaj prezentis belajn diapozitivojn pri Sidnejo, aùstraliaj floroj kaj bestoj. Honore al niaj gastoj, ni kunmanĝis en apuda restoracio bujabeson kiun niaj aŭstraliaj amikoj tre ŝatis ! !

La 29 an de Majo, ni akceptis du hungarojn, el Budapeŝto, gastoj de Gesinjoroj BERNE. Ili remermorigis al ni la budapeŝtajn belaĵojn.

Dum junio, la kvina, Sro RAYMOND lerte prelegis pri la "Danĝero de la tabako", kvankam neniu fumas en la grupo ! ! !

Ni fermis la sezonon per amika renkontiĝo en la vilao de niaj amikoj TRUFFIER, en Saint-Cyr la Cadière.

La ekzamenoj, atesto pri lernado kaj superatesto pri lernado fermis la kursojn. Bedaùrinde la nombro de la kandidatoj estis malgranda malgraù la sperteco de niaj profesorinoj, Sinjorinoj FRACCIOLI, JURQUET kaj VILLANOVA

GARRIGUE

V - MONTE-CARLO - Sub la konstanta impulso de Samideanoj Dro Henri CORYNEN, Prezidanto, Louis VANNINI kaj Sino Madeleine PARIS de BEAUVAIS, Vic-Prezidantoj, P. FAIVRE-DUBOZ, Gesinjoroj J.J.DERKS kaj Sino Olga de MONTY, Posedantino de la Palachotelo " le Splendid" tre konata de la esperantistoj, la Grupo de MONACO daŭre prosperas, enkalkulanta nun 99 anojn.

La Monaka esperantistaro, kun laŭdinda fideleco, ĉiukaze manifestis sian solidarecon al la tutregiona esperantistaro per partopreno al diversaj renkontiĝoj organizitaj ĉu de la Esperanto Nica Grupo, ĉu de la kunordiganta komitato "Konkordo", tiel farinte pruvon de firma volo por helpi al nia komuna triumfo.

La 5 an de Junio, en la M.J.M.C. Dro Corynen kaj Sro Derks prezentis Cekoslovakan samideanon Sron HRUBES kiu faris tre interesan prelegon pri sia lando.

En Monte-Carlo, la kursoj daŭras kontentige, faritaj de Sino PARIS de BEAUVAIS kaj de Dro CORYNEN.

La grupo aperigis multajn artikolojn en la loka gazetaro.

VI - NICE - La kurso de Norbert PAZZINI, en la Komerca Cambro estas nun finita, same kiel la kurso por preparado al Atesto pri Kapableco kiun faris, villa "Les marguerites" Hub. FEREZ.

La 24 an de Majo la Grupo, honore de la Esperantistaj Rotarianoj, organizis komunan manĝon en Restoracio "Dominio" kie speciale bongusta menuo estis prezentita. Cirkaŭ 30 gegastoj partoprenis.

Kiel kutime, ĉiun merkredon vespere, je la 9 a horo, renkontiĝas la esperantistoj en "Café Terminus" kie ofte eksterlandanoj nin vizitas.

La samideanoj, kiuj, la 14 an de junio, ĉestis tiun amikan rondon havis la GRANDAN ĜOJON akcepti nian eminentan samideanon Ralph HARRIS, Australia Ambasadoro en Bruxelles tre lerta Esperantisto; la saman vesperon, venis ankaŭ la Delegitino en Anvers Sino Léa BAERT-TOUSSAINT (kiun ne konis Sam. HARRIS).

Konkludo : Vizitu multnombre la ĉiumerkredan rondon !!

Kafejo "Terminus" situas vid'al vide de la Cefstacidomo S.N.C.F.

La Nica gesamideanaro, ĉiuokaze, alportis amasnombre kun entuziasma amikeca sento al la Renkontiĝoj kaj diversaj manifestacioj organizitaj de la Komitato "Concorde" sian solidarecan kontribuon - signo de volo al venko !

VII - SOLLIES-PONT - Oktobre 66 - Malfermiĝis 4 kursoj : du por komencantoj, du por daŭrigantoj. Enskribiĝis 51 gelernantoj inter kiuj tri patrinoj. Sekvis akurate la kursojn ; 25 geknaboj kiuj ricevis premion + la patrinoj.

Okazis paroladeto kun lumbildoj pri la infanaŭstria vojaĝo.

29.Januaro 67 - Familia Festo kies prezidantecon akceptis Senatoro BALESTRA, kiu mem Ĉeestis. Oni manĝis reĝkukon kaj trinkis Ŝaumvinon (la infanoj trinkis limonadon). Ĉeestis 230 personoj.

23.Aprilo 67 - Ni ĉeestis la Federacian Kongreson, partoprenis la ekskurson : 50 geknaboj kaj gepatroj. (Ni profitis la okazon por danki Sinon HUMM, Gesinj. GENTE pro ilia bonega akcepto de niaj geknaboj - precipe en la lernejo de Gesj. GENTE).

21. Majo 67 - Pikniko en la arbaro de la ĉirkaŭaj montetoj. Ĉeestis 36 geknaboj kaj 35 gepatroj. Bonega amuza tago.

4.Junio 67 - Ekzameno de "Atesto pri Lernado". Prezntitaj : 6; sukcesintaj : 5

24.Junio 67 - Disdonado de premioj :
5 baptêmes de l'air
8 libroj "Ĉu vi scias" (valoro 8 F)
2 albumoj kaj poŝtmarkojn oferis komercisto el la Farlède. La legolibrojn oferis la "Amicale" kaj "Baptêmes de l'Air" l'Aéro-Club" du Var.

12.Juillet 67 - Ni foriros ĝis MARIBOR (Jugoslavio) kun 20 geknaboj kaj 6 plenkreskuloj. Tio estos nia somera infanvojaĝo. La infanoj renkontos en Maribar, de lastjare, jam konatajn geknabojn. Aranĝos la vojaĝon en MARIBAR Sro Ludoviko PREBIL, honora Instruisto

A. MATHIS.

VIII - TOULON - La kursoj faritaj al 20 gelernantoj de Profesoro VOGRIS estis tre interesaj kaj multe plaĉis al la gelernantoj; ili finis fine de Majo. Tri lernantinoj prezentiĝis al la ekzameno kaj sukcesis.

Acepto de hungaraj Esperantistoj.

La grupa biblioteko starigita de Sino C. JURQUET iom post iom pliriĉiĝas. Sed mankas facilaj libroj por junuloj. Kiu povos sendi kelkajn al la bibliotekistino (samtempe Generala Sekretariino de la Grupo) estos kore dankindaj.

Konsistigo de la nova Komitato : Sro Lucien AMAT, Prezidanto.-Sino JURQUET, Generala Sekretariino - Sro JURQUET. organizanto de la esperantista studentaro - Sinj. CAVALIER kaj RICARD. Vic-Prezidantoj - Sro CA PBERN,Kasisto - Sino GOURS, Helpkasistino kaj Sro Roger MARGLIER, Konsilanto.

Ni esperas rapidan prosperon al la juna "TULONA ESPERO".

IX - VALLAURIS - La 7 an de Majo okazis, sub la Prezidanteco de Hubert FEREZ, disdono de diplomoj kaj premioj al la laùreatoj de la Esp. kurso. Ĉeestis pli ol 60 personoj. La Prezidanto, post dankoj al la urbestraro, al Fino Léa ESPITALLIER kaj al Sro TRIOU, la distingita Prezidanto de la Esperantistaro el Cannes kiuj multe helpis al la sukceso de la kurso, sin turnis al la laùreatoj kaj al ties profesoro Sro LANZO, kiu, pro sia senlaca sindonemo, meritas ĉies dankemon.

Sekvis bankedo kun pli ol 50 gastoj, en gajega etoso. Gesinjoraj KLEIN venis el Monte-Carlo por subteni nian agadon. Por kontentigi la ĉies postulemon Sino KLEIN kaj Sino CAVELAN konsentis kanti kelkajn ariojn kiuj ĉarmis kaj entuziasmis la tutan ĉeestantaron. Je kontento ĝenerala sin oferis ankaù Sro Lamaccia, Sro KREIBIG kaj Sro LANZO kiuj prezntis ion el sia repertuaro.

Kontentiga manifestacio.

---

## En nia familia rondo

Sukceso - Niajn plej varmajn gratulojn al nia Samideanino Sino Fernande CAVELAN al kiu, en NICE, estis, antaù kelkaj semajnoj, atribuita la lan Premion por Tragedio, en prezentado de Phèdre.

---

HELPU AL NIAJ FINANCOJ .... Certe, kiel promesite, ĉiu Federaciano daùre ricevis kaj ricevos senpage "CONCORDE". Tamen, ĉiu komprenas ke eldono de bulteno estas granda ŝarĝo. Ni do antaùdankas tiujn, kiuj povonte tion fari favoros de tempo al tempo nian modestan entreprenon per sia subteno.

---

## Renkontiĝo en EZE-Village

La rekontiĝo - sub formo de ĉarmplena pikniko - organizita de la Komitato "CONCORDE" apud EZE-Village, en la loko t. n. "La forgesita Muelejo" arigis 52 partoprenintojn el Monte-Carlo, Nice, Cannes, Vallauris, Grasse kaj kelkajn eksterlandajn amikojn.

Hubert FEREZ substrekis la ĝojigan fakton ke kreskas konstante la nombro de l'partoprenantoj al niaj amikaj renkontoj kaj ke, iom post iom, ankaù kreskas la nombro de tiuj, kiuj povas paroli Esperanton ! Raymond FIQUET raportis pri la de li ĵus fondita "Rotaria Asocio de Esperantistoj" (RADE) okaze de la tutmonda Rotaria Konvéncio. Rusa samideano, Dro ROBINSON, kiu parolis perfektan Esperanton igis grandan intereson.

Dro Henri CORYNEN, per ŝalmo, antikva paŝtista fluto (pipeau-france) ludis tre agrablan arion tute harmonintan kun la poezia pejzaĝo. Siavice nia Nica stelulino Fernande CAVELAN regalis la piknikintaron per siaj kantoj. Ni ankaù aùdis samideanojn LANZO kaj LAMACCIA.

---

## DIDAKTIKA ANGULO

Por viaj publikaj kursoj, uzu "Esperanto-Pochette", cours complet sur feuilles

séparées, en 22 leçons, qui a contribué énormément au succés de nombreux cours dans la région (Cannes, Toulon, Vallauris, Mougins, Marseille, Monaco, Grasse).
Isolés : Suivez nos Cours Complets d'Esperanto par correspondance (enseignement gratuit).
Esperantistes (principalement vous débutants) LISEZ, LISEZ, LISEZ....
Voici quelques livres que vous devez avoir lus :

| | | |
|---|---|---|
| HAMLETO, de Shakespeare (mirinde bona traduko) | | 14,00 F |
| LINGVAJ RESPONDOJ, de Zamenhof | broché | 8,20 F |
| | relié toile | 11,00 F |
| FUNDAMENTO DE ESPERANTO, de Zamenhof | broché | 13,70 F |
| | relié toile | 18,20 F |
| SEN ELIRO et LA RESPEKTEMA P... de Sartre | | 8,60 F |
| LA KUNPRINCLANDO ANDORO, LASTA FEUDA STATO | | 8,10 F |
| Excellent DICTIONNAIRE FRANCAIS-ESPERANDO de ALBAUT | | 21,60 F |

## POUR LES JEUNES

Livres Illustrés

Pour la premièrefois, série de 10 livres tout en Espéranto, pour enfants à partir de six ans et comprenant les titres suivants :

1. La ratkaptisto el Hameleno
2. Vespero en la cirko
3. Pli kaj pli rapide
4. La kuraĝa tamburisteto
5. Kun niaj amikoj, la Bestoj
6. Orharulo kaj Ruĝakresto
7. Aladino kaj la mirinda lampo
8. Kaj nun ni eklaboru
9. Kampomuso ekskursas
10. Eta plumba soldato

Avec couverture cartonnée,
le tout richement illustré, en couleurs.
La série complète des dix livres ...franco 10,00 F

RICEVO DE CIUJ TIUJ LIBROJ POST ANTAUPAGO AL DIREKTORO DE "CONCORDE".